JUNIO 1953 Maandblad 24-a jaro. N-ro 6 (577)

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo k redaktejo:
67 avenue Gambetta, Paris 20
Redaktoro: N. Bartelmes, sama adreso.

Eldonejo de SENNACIULO:
C. van Essen,
Floretstraat 10, Rotterdam-Z.

# RAPORTO DE LA PLENUM-KOMITATO DE S.A.T.

## POR LA PERIODO JUNIO 1952-MAJO 1953

**Plenum-Komitato.** — La laboro de l' P.K. estis farata en harmonio k kun respondecosento de la ses komitatanoj, el kiuj bedaŭrinde unu (K-do Glodo) mortis lastnovembre. Ĝia anstataŭanto estas elektita ĉi-printempe (vidu la antaŭan numeron!) de la pariza SAT-anaro (K-do P. Levi). La komitataj kunvenoj okazis regule ĉiumonate; en ili estis pritraktataj ĉiuj kurantaj aferoj. Pri la decidoj regis unuanimeco rilate la esencon de la traktitaj demandoj.

**Administracio.** — K-do Kotro, helpanto dum longaj jaroj ĉe la Sidejo, translokiĝis al la kamparo en majo de tiu ĉi jaro; ni sciis sufiĉe frue pri tiu okazontaĵo por instrui anstataŭanton, nome K-don Legros, pri la adresmaŝino desegnita, konstruita k donacita de Kotro. Ni tiuokaze deziras ankoraŭfoje akcenti, kiom da utila helpo alportis K-do Kotro al la Asocio, okaze de sia pariza aktiveco!

K-do Bartelmes, salajrata ĉe la Sidejo, dejoris plue kiel redaktoro, sekretario, zorganto pri la membro-sliparo k tajpanto de l' multnombraj korespondaĵoj; K-do Dauphin, laboranta duontempe, daŭrigis zorgi la librotenadon k ellaboron de l' bilancoj.

K-do Bannier tenas, en siaj liberaj horoj, la kaslibrojn, zorgas pri la tuta financa parto de la asocia vivo k sekretarias pri perantaj k eldonfakaj aferoj. La ekvilibriĝo de l' spezoj, la zorgo pri la enkasigo de l' mono, la interlanda cirkulado de devizoj, kuŝas sur liaj ŝultroj.

**Ĝenerala Konsilantaro.** — Cirkulero, kiu entenis ĉefparte la bilancon por la jaro 1951, estis sendita en februaro de la P.K. al tiu ĉi kontrola k direkta instanco; al ĝi ne respondis ĉiuj konsilantoj. SAT-Amikaro elektis novan Ĝ.K.-anon: K-do Marso; en Koresponda Servo-Centro K-do Schrimpf, Munkeno, anstataŭas K-don Bitzer.

**Redaktado.** — K-do Bartelmes, en sia redaktado de „Sennaciulo", pli ol unu fojon turnis sin pro konsilo al la P.K. Kelkaj debatoj tendencas tro-etendiĝi, kio kondukas al certa tediĝo de la legantoj, kiuj fine spitiĝas k plendas aŭ... malabonas. En la debato pri „Demokratio", kiu pasiigis multajn k-dojn, ni devis decidi pri rifuzo de publikigo de pluraj artikoloj, kiuj glitigus „S-ulo"n sur la vojon de intertendenca polemikado senfina k senrezulta. Vidante tiujn akrajn k politikecajn reagojn de pluraj skribantoj, ni en iu momento preskaŭ eksentis bedaŭron, ke ni aŭdace publikigis la unuan artikolon de k-do G. J. D. Ja kiun konkretan profiton tia pasieca debato donas por la instruado de l' legantoj? Kaj tut-evidente la partoprenantoj en tiu „turniro" restis neflekseblaj sur siaj respektivaj pozicioj, cedante neniom el sia propra opinio.

**Sennacieca Revuo.** — En la redaktado de la ĉi-jara kajero K-do Bartelmes estis forte asistata de K-do Dazun. Pro tio ke pluraj aŭtoroj rezignis, pro eksteraj malhelpoj, en konsentita tasko, aliaj sendis tre malfrue sian kontribuon, la kompilado de l' kajero ne estis facila; sed fine kolektiĝis tiom da artikoloj, ke kelkaj devis esti prokrastataj ĝis la proksima n-ro. Kompense por nia penado ni aŭdis multajn laŭdojn pri tiu ĉi kajero.

Ne ĉiuj SAT-anoj tamen konscias pri la graveco de tia Revuo, unika en nuntempa Esperantio, pri la rolo kiun ĝi povas k devas ludi en la plenumo de la statutaj celoj de SAT. Ja ĉi-jare la abonantnombro al la Revuo grave regresis, kompare kun 1952 (je meze 20%), en ĉiuj landoj kun konsiderinda membro-nombro (ni esceptas Jugoslavion, kie speciala aranĝo permesis al ni grave plialtigi la abonantnombron). Ni atribuas tiun perdon unuparte al la ĝenerala dekliva tendenco en la nombro da organizitaj k abonantaj esperantistoj en la mondo*), aliparte al psikologia faktoro: la Revuo aperas nur unu fojon jare; multaj legantoj esperis ricevi pli, eble ne laŭ nombro da paĝoj, sed laŭ nombro da kajeroj; ili ne forgesu, ke eldono de unu tia luksa kajero jam estas grava risko en la nuna tempo k ke ĝuste ĝia plaĉa aspekto, pro la multnombro da paĝoj, igas ĝin tre konvena varbilo en la manoj de propagandistoj.

La Arhuza kolektivo, precipe K-do H. P. Larsen, meritas laŭdan mencion pro siaj klopodoj pri eldono k ekspedo de S.R.

**Diversaj eldonoj.** — La kalendareto en tiu ĉi jaro ne disvendiĝis laŭ la sama nombro da ekzempleroj kiel en antaŭaj jaroj. La Nederlanda L.E.A. rezignis tute pri ĝia disvendo, pro malbonaj spertoj pasintjaraj, k en tiu teritorio ni komisiis al lokaj perantoj de SAT zorgi pri ĝia distribuo.

La „Historio de SAT" (1921-1952), ĉ. 144 paĝoj, 10 bildoj, teksto kontrolita lingve de la Literatura Komitato, iris en presejon fine de aprilo. Ni esperas povi liveri la volumon antaŭ la Ŝefilda Kongreso. La aperigo de tiu libro estis deziresprime komisiita al la P.K. jam en la jaro 1948, okaze de la Amsterdama Kongreso. Ni do asignis al ĝi la unuan vicon el inter la eldonotaj verkoj.

En marta „S-ulo" ni informis koncize pri elĉerpiĝo de la tria eldono de „Plena Vortaro", reproduktita per fotado (ofseto). Necesis do tuj entrepreni la reeldonon (ankaŭ per ofseto) de la verko, ĉi-foje en Francio; al ĝi estos aldonataj kelkaj novaj paĝoj kun nepre necesaj terminoj, kiuj intertempe enkondukiĝis en la lingvo, aŭ kiuj ial mankis en la antaŭaj eldonoj. La libro aperos en tre praktika, reduktita formato, kun fleksebla tolkovrilo. Ekzaktan aperdaton ni ne povas antaŭvidi.

Konekse kun tiu re-eldono ni menciu nian elpaŝon (en decembra n-ro de „S-ulo") kontraŭ verko iniciatita de Fr. Azorin, Meksiko, sub titolo „Ilustrita Vortaro de Esp.". Ni eksciis, ke Azorin vokis la moralan subtenon de kelkaj lingve kompetentaj esperantistoj, sed vane!

Dume, kvankam en tiuj ĉi jaroj de ekonomia perturbo la financa fundamento por tiel ampleksa verko kiel la „Plena Ilustrita Vortaro" ankoraŭ ne estas trovita, la ellaborado de la verko ne estas interrompita.

Ni ne parolu pri aliaj planitaj libro-eldonoj, ĉar la nuntempa marasmo sur la libro-merkato bedaŭrinde kontraŭas al rapida efektivigo de l' eldonplano. Ĉiuokaze ni ne rezignas pri reeldono de „Kandid" (Voltaire-Lanti), tiu signifoplena verko, kiu legiĝas relative facile k kies unua eldono trovis ĉe la esperantistoj bonan akcepton.

**Jarlibro.** — Laŭ nia plano la nova jarlibro devis aperi en la unuaj tagoj de ja-

*) Vi notu, ke ĉi tiu falo kelklanda ne atingas la proporciojn de la regreso en abonoj al „S. Revuo". Male, en kelkaj landoj SAT bone antaŭeniras; en aliaj ĝi sin tenas kun malgranda perdo (meze 8%). Cetere ŝajnas al ni utile atentigi, ke en ĉiuj esperantistaj organizoj la jaro 1952 alportis perdojn de membroj (ni citu U.E.A.: malplio da membro-abonantoj: F. L. E.; la malapero de „Malgranda Revuo", de „Interligilo PTT", la malgrandiĝo de l' svisa, de l' dana neŭtrala gazeto, k.a.).

nuaro; fakte ĝi aperis kun trimonata prokrasto. La presisto, kiu dufoje en dezirata tempospaco produktis la jarlibron (1949 k 1950-51), komencis ĉi-foje la laboron nur en januaro, kvankam la manuskripto iris en la presejon meze de oktobro 1952! La presisto senkulpigis sin per mencio de preslaborista striko en novembro: ni konkludas, ke post fino de tiu striko li havis multe da aliaj jarfinaj laboroj k tial prokrastis la produkton de nia jarlibro, malgraŭ niaj admonoj k tiuj de nia hamburga peranto, K-do Theobald. Niaflanke ni miskalkulis tiurilate, ke ni elektis la 31-an de decembro kiel aperdaton por la verko; en tiu okazo **eble** la presisto povus plenumi nian mendon je la antaŭvidita dato, se ni estus liverintaj la manuskripton jam en somero 1952 (du monatojn pli frue!). Ni notas tion memore por la venonta eldono. Kompreneble intertempe multaj adresoj ŝanĝiĝis; ni presigis regule en „S-ulo", laŭ rekomendo de la lasta kongreso, la **korektojn**, kiam temas pri novaj lokoj aŭ pri forstreko de lokoj.

Kiel lastjare, K-do Theobald kun anoj de la hamburga SAT-rondo donis malavare sian helpon, akceptante la eksped-laboron, k la personajn rilatojn kun la presisto.

**Landaj perantoj.** — Novaj perantoj transprenis la taskon en **Kanadio** (K-do Vicente), en **Jugoslavio** (K-do Vajdliħ), en **Japanio** (K-do Kuwahara), en **Argentinio** (K-do Bosso), en **Brazilio** (K-do de Brito Lopes). La kolektivo en **Ĉilio** tute disfalis, post rezigno de K-do Garcia je peranteco (li ne plu reagis al niaj skriboj de du jaroj).

Feliĉe ni povis konservi nian fervoran K-don Bonesper en Novjorko, kiu dediĉas tiom da fortoj al la konsistigo k aktivigo de la SAT-membraro en **Usono**. Li ja estis serioze malsana en la fino de 1952 k devis kelkan tempon interrompi sian aktivecon (duan fojon en aprilo).

La membro-movado montras notindajn progresojn en **Japanio, Jugoslavio, Finlando,** etgrade en **Aŭstralio,** stagnadon en multaj landoj, ekz. **Britio,** kie la kongreso ankoraŭ ne povis montri siajn efikojn, **Skandinavio,** regresojn, ne timige gravajn, en la grandaj membrokolektivoj de **Francio, Nederlando** k **Germanio.** Pri Brazilio ni ne havas klaran bildon: la nova peranto nur malrapide sukcesas regrupigi la tutan anaron; liaj raportoj antaŭvidigas, ke ni retrovos fine la membronombron de l' lasta jarlibro; espereble eĉ ni povos trafi tie al novaj rezultatoj, ĉar la disvastigo de esperanto en Brazilio kontinuas.

Ni devis tute ĉesigi la ekspedon de gazetoj al **Ĉeĥoslovakio** k **Polio***). Tio signifas, ke lastaj bastionoj en Orienta Eŭropo perdiĝas por SAT... **portempe,** kiel ni esperoplene substrekas; ja ne formortis la SAT-idealo en la koroj de centoj da orientregionaj kamaradoj.

La laŭlandaj statistikoj ĉe la fino de la nova Jarlibro donas la plej fidelan bildon pri la stato de la membraro fine de la jaro 1952. Ne estas eble jam nun prezenti komparan ciferon por la jaro 1953, ĉar bedaŭrinde el pluraj landoj ni ricevas la listojn pri kotizintoj nur post la 1-a de majo, eĉ parte ne antaŭ julio. La nombroj, kiujn ni tiukaze publikigus, sekve ne spegulas tre ekzakte la efektivan situacion de la membraro; la ĝusta proporcio inter-landa de la membraro ne aperus. Tial ni rezignas aperigi ĉi tie statistikan bildon laŭlandan, tamen ni volas rimarkigi, ke meznombre okazis regreso ĉe la anaro de proks. 8% kompare kun la sama periodo en 1952, k je 15% kompare kun la sama dato de l' jaro 1951, kiam ni ankoraŭ kalkulis 64 anojn en Ĉeĥoslovakio.

**Solidarservo.** — Ĉi-jare tiu ĉi Helpservo transpasis multe la kutiman kadron de nia Servo; ja la situacio post la 1-a de februaro en pluraj regionoj de Nederlando, kie la ŝtormego subakvigis insulojn k partojn de la kontinento, postulis eksterordinaran streĉon de niaj rimedoj. Pri la tuj akirita rezultato de nia voko al helpo ni povas esti fieraj; ĝi multe superis niajn atendojn, se oni konsideras la relative malaltan membronombron de SAT k ĝian negravan disradiadon tra la mondo, k se oni komparas la rezultatojn kun tiuj de aliaj asocioj, esperantistaj aŭ ne.

Ni resendas la legantojn al la tri lastaj numeroj de „S-ulo", en kiuj ili trovas ciferojn k faktojn.

Vizitintoj al **Hispanio** raportis al ni pri la tie reganta ekstrema mizerstato inter la proletaro. Tial ni decidis meti rezerve je la dispono de nia landa peranto sumon de 28.60 dolaroj, por helpi, en urĝaj kazoj, al tiuj anoj el nia Asocio, kiuj plej multe suferas de mankoj. Ankaŭ ni asignis el la monrimedoj de la Servo sumeton al aŭstra invalido-pensiulo, fervora SAT-ano, kies situacio estas ne-enviinda.

Modesta estas la helpopovo de nia sennacieca Solidar-Servo. Mono ne abundas; male, restas ankoraŭ deficito el antaŭa periodo, kiam k-do Bonesper elspezis multe pli, por tuj helpi en centra Eŭropo, ol kolektiĝis sumoj el bonvolemaj kamaradoj. Supraj faktoj montras al vi, ke urĝe necesas forviŝi la pasivon de la Servo k tiel meti ĝin en staton alfronti novajn postulojn k plenumadi sukcese k kontentige sian taskon.

**Kongresoj.** — La 25-a Kongreso de SAT en Duseldorfo signifis moralan sukceson, en sia impona kadro (kongreshalo apud la Rejno) k en sia harmonia pasado, sed ĝi lasis krome ioman financan profiton al la organizinto k al la Asocio. Tio estas substrekinda, ĉar la organizado postulis grandan budĝeton k ne estis senriska. Flanke de la ĝeneralaj aranĝoj, laborkunsidoj k prelegoj, okazis kunveno de la SAT-funkciuloj (P.K.-anoj, landaj perantoj, ĝeneralaj konsilantoj, K.K.-anoj), en kiu administraj k laborplanaj demandoj estis traktataj k solvataj.

La ĉi-jara Kongreso apud Ŝefildo, en Britio, prezentas tute novan eksperimenton de l' kongresa tekniko. Ĝi havas la grandan avantaĝon, ke la loĝiga demando estas solvita laŭ maniero simpla k favora al konstanta interkomunikado de l' partoprenantoj. La birminghamaj SAT-anoj bonvolis akcepti sur sin la organizan taskon, kvankam la kongresejo troviĝas multe distance de Birminghamo, pro kiu ni ĉiuj devas esti dankaj al ili. Kamaradoj, kiuj timas la transportkostojn, konsideru aliflanke la tre moderan elspezon, kiun prezentas la tutsemajna restado en la kongresloko mem.

La Plenum-Komitato delegis reprezentantojn al la Kongreso de F.L.E. en Hago (K-don Bartelmes) k al la Kongreso de SAT-Amikaro en Angulemo (K-ino Dazun), ĉe kiuj estis organizita speciala kunveno por SAT-anoj kun informado pri SAT. K-do R. J. Martin transdonos salutojn nome de la P.K. ĉe la germana esperanto-kongreso en Frankfurto.

**Korespondа Servo.** — La ĝisnuna centra prizorganto de tiu Servo, K-do Bitzer en Munkeno, devis pro malsan-stato rezigni je sia posteno, kiun li plenumis kun granda zorgemo k lerteco. Ni dankas al li ĉi-loke pro lia bona laboro, k ankaŭ pro tio ke li mem trovis anstataŭanton en Munkeno mem, en la persono de K-do Schrimpf.

**Fakoj, Frakcioj.** — Restarigita estas la Liberpensula Frakcio, kies regularon sendis al ni la Sekretario, K-do Gay; ĝin ni agnoskis, ĉar ĝi estas konforma al la kodo pri frakci-regularoj. La Junul-Fako nur malofte profitis el sia rajto aperigi „angulon" en nia gazeto.

**Varbado de novaj membroj.** — Kiel vi vidis el la membro-ciferoj antaŭe donitaj, ni ne povas paroli pri kreskado de nia movado en la plimulto el landoj k regionoj. Ni konstatis, ke tiu stagnado (aŭ eĉ regresado) trafis ĉiujn esp. organizojn k precipe ankaŭ gravajn LEA-ojn, el kiuj SAT rekrutadas novebakitajn adeptojn. La LEA-gazetoj, kiel antaŭe, lojale donis spacon al SAT-varbado, atentigis pri niaj eldonaĵoj k pri nia aktiveco. Ne kulpas ili, se la propagando ne falis sur tiel fekundan grundon, kiel en la esperigaj jaroj tuj sekvintaj la militfinon.

Precipe niaj membroj en Germanio, pro neekzisto de LEA-o en tiu lando, sentas la mankon de regula informilo-interkontaktilo propagandeca. La provo liveri aldone al „S-ulo" multobligitan bultenon „Voĉoj de SAT-anoj el Germanio", farita en tiu lando mem, ne estis tre prospera, laŭ la konstatoj de informkunveno de germaniaj membroj marĝene de la Duseldorfa SAT-kongreso. Ni observas simpatie la nunan klopodon de nia landa peranto, K-do Puff, k de la frankfurta kolektivo, por trovi kontentigan solvon al tiu problemo esence grava por la SAT-varbado.

**Financa Raporto.**

1) **Kontado.** — Malrapide sed senĉese ni viŝas la kaoson, kiu lamigas nian kontadon de pluraj jaroj. Iom post iom proksimiĝas la tago, kiam restos prilaborotaj nur la spezoj de la kuranta monato.

En februaro 1953 ni dissendis la Bilancon por la periodo januaro-decembro 1951 al la Ĝeneralaj Konsilantoj, al la Konflikt-

*) Tiu sorto frapis ne nur la SAT-gazetojn; gazetojn; ankaŭ tute neŭtrala organo sen politikeca fono fiaskis en siaj klopodoj penetrigi la numerojn en Ĉeĥoslovakion k Polion. — Ni rimarkigu, ke pri *Hungario* ni havis pli da bonŝanco, kvankam ankaŭ tie la gazetoj ofte ne trafas la kelkajn interesatojn.